

INSTRUI PACON

Responde al Mihail Trifoi (Vidu IPR 2014/3, paĝo 18)

« MALJUSTE !! TIO ESTAS MALJUSTA DISDONADO !! Vidu ! Li ricevis dikan sandviĉon, oranĝosukon, pomon kaj jogurton, kaj mi... mi ricevis nur panon kaj akvon !! Mi koleras !! Mi ŝatus bati lin !! Certe mi batos lin !! » Tion mi aŭdis, kiam mi lanĉis aktivecon : « La kolera manĝo ». El kvar piknikoj unu estas luksa kaj tri estas magraj : nur pano kaj akvo. Imagu grupon el 24 junuloj, kie 18 vidas la 6 ceterajn gustumi abundan manĝon... Kolero aŭdiĝas. Tia aktiveco simbolas la situacion en la nuna mondo. La partoprenantoj sentas, flaras, gustumas, spertas fizike kaj konkrete la maljustecon de nia mondo. (Detala priskribo legiĝas en <http://www.noos.ch/ideo/aktivecoj.php?L=eo>) Lernantoj kaj gepatroj de ili diris al mi : « Se ni forgesus ĉion de nia lerneja tempo, tiun lecionon ni neniam povos forgesi ».

Se instruado pri paco, solidareco, toleremo konsistas el prelegoj, klarigoj, konsiloj, la aŭskultantoj tuj forgesos. Se la studentoj ion faras, manipulas, spertas, ili memoros tiun sperton. Instruado pri paco nepre estu konkreta. « La kolera manĝo » estas unu el diversaj aktivecoj, kiujn instruistoj povas organizi tiucelen.

En 2002 mi ricevis peton koncepti plenan instruprogramon pri edukado al paco. Tion mi faris. Bv esplori inter la versioj en dek lingvoj.

<http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=41&s=c1c3411b796a0713cdb33e5b35c99476> Se versio en via lingvo ne ankoraŭ ekzistas, bv helpi tradukante en vian lingvon ! Venos du afrikaj lingvoj, ewe kaj bambara, danke al Raymond AFANTCHAO, profesoro pri homaj rajtoj en la universitato de Lomeo.

Legante la tekston de mia amiko Mihail Trifoi, mi hontis, ke mi ne ankoraŭ sukcesis traduki en Esperanton mian kurson pri konfliktoŝolvado. Temas pri 50 paĝoj en la franca... Mi instruis per ĝi dum pluraj jaroj al gejunuloj. Ĉiuj esprimis sin pozitive pri tiu kurso kaj asertis : « Ĉiuj homoj devus ricevi tian instruadon ! » Se tiu kurso estus en Eo sur la Reto, iuj personoj en la mondo povus elŝuti kaj uzi ĝin. Tempo mankas al mi.... Kie trovi 48horajn tagojn ?

Solvo montriĝas en Togolando : Apelete AGBOLO pretas fari tiun tradukon. Mi plu informos vin pri tiu tradukado, kiun Germain PIRLOT el Belgio pretas kontroli.

Mireille Grosjean